

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orengo. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOL. I * N-RO 5

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JUNIO 1932

La „problemo“ ata-ita.

La Esperanto-gramatiko estas simpla kaj logika. Do, verdire, ne ekzistas „problemoj“ en la Esperanto-gramatiko. Sed imitado de nacilingvaj kutimoj aŭ sofisma hiperlogikeco ofte malsimpligas ĝin, kondukas al miskomprenoj, eĉ eraroj, kaj kreas la „problemojn“.

Unu el ĉi tiuj „problemoj“ estas tiu de **ata-ita**. Kiam oni pritraktas ĝin, komparante la t. n. „malsimplajn tempoformojn“ kun tiuj de naciaj lingvoj, oni facile estas tentata konstati malfacilaĵojn; sed kiam oni pritraktas ĝin libere de nacilingvaj formoj, direktante sin nur laŭ la logiko kaj simetrio, oni trovas ke ĝi estas unu el la plej simplaj aferoj en la mondo.

Ni prenu, kiel ekzemplon, mallongan epizodon, kiun ni (image) estas observantaj kaj kiun ni tial priskribas, uzante la estantan tempoformon **-as**:

1. Sinjoro intencas eniri domon.
2. (Sed) la pordo estas fermata.
3. La sinjoro sonorigas.
4. La pordo estas malfermata.
5. La sinjoro eniras.
6. La pordo estas ree fermata.
7. (Nun) ĝi estas ree fermata.

Intence ni elektis nur tre simplajn frazojn. Ni esperas, ke neniu leganto sukcesos trovi en ili eraron pri la tempoformoj. Ĉio estas tute klara, ĉu ne? Bone!

Ni nun imagu, ke pasis iom da tempo, kaj ni rakontas la epizodon al amiko, uzante do la pasintan tempoformon, t. e. **-is** (anstataŭ **-as**); ĉio cetera restas senŝanĝa:

1. Sinjoro intencis eniri domon.
2. (Sed) la pordo estis fermata.
3. La sinjoro sonorigis.
4. La pordo estis malfermata.
5. La sinjoro eniris.
6. La pordo estis ree fermata.
7. (Poste) ĝi estis ree fermata.

Fine, ni imagu, ke iu verkisto intencas priskribi (en estonteco) ĉi supran epizodon. Li faras al ŝi planon, uzante do la estontan tempoformon, t. e. **-os** (anstataŭ **-as** aŭ **-is**); ĉio cetera refoje restas senŝanĝa:

1. Sinjoro intencos eniri domon.
2. (Sed) la pordo estos fermata.
3. La sinjoro sonorigos.
4. La pordo estos malfermata.
5. La sinjoro eniros.
6. La pordo estos ree fermata.
7. (Poste) ĝi estos ree fermata.

El la supre cititaj frazoj interesas nin, en ĉiuj tri kategorioj (estanteco, pasinteco kaj estonteco), precipe la frazoj kun la t. n. „malsimplaj tempoformoj“. Ni vidas ke en ĉiuj tri kategorioj la **participoj** restas ĉiam la samaj kaj senŝanĝaj, kaj ke en ĉiuj tri kategorioj (estanteco, pasinteco, estonteco)

ĉiuj verboformoj absolute harmonias, ke ili montras absolutan simetron. Se ankaŭ en la 4-aj kaj 6-aj frazoj de ĉiu kategorio ni uzus la ita-formojn, oni ne plu povus diferencigi la sencojn de la malsimplaj formoj en tiuj ĉi frazoj (4 kaj 6) kaj tiun de la malsimplaj formoj en la frazoj 2 kaj 7. Konstatu mem:

1. Sinjoro intencas (-is, -os) eniri domon.
2. (Sed) la pordo estas (-is, -os) fermata.
3. La sinjoro sonorigas (-is, -os).
4. La pordo estas (-is, -os) malfermata.
5. La sinjoro eniras (-is, -os).
6. La pordo estas (-is -os) ree fermata.
7. (Poste) ĝi estas (-is, -os) ree fermata.

Kion do esence signifas **ata** kaj **ita**? **Ata** signifas **samtempecon** (daŭron de la ago) rilate al la momento, pri kiu oni parolas (do ion, kio okazas en la sama momento, pri kiu oni parolas); **ita** signifas **antaŭtempecon** (finitacon de la ago) rilate al la momento, pri kiu oni parolas (do ion, kio okazis pli frue ol en la momento, pri kiu oni parolas, — ion kio jam estis finita en la momento, pri kiu oni parolas). Atentu bone „rilate al (aŭ: en) la momento, pri kiu (ne: en kiu) oni parolas“:

En frazo 4 de la dua kategorio (pasinteco), „la pordo estis malfermata“ signifas, ke la pordo estis malfermata (do, la ago estis ankoraŭ daŭranta) en la momento, pri kiu parolas la rakontanto; en frazo 2, „la pordo estis fermata“ signifas, ke la pordo estis fermata jam pli frue ol (do, la ago jam estis finita) en la momento, pri kiu parolas la rakontanto, t. e. en la momento, kiam la sinjoro intencis eniri la domon.

Multaj miskomprenas la vortojn „daŭro“ kaj „finitaco“. Ne temas ja ĉi tie pri absoluta daŭro aŭ absoluta finiteco, sed nur pri daŭro aŭ finiteco rilata, nome rilate al tiu momento, pri kiu oni parolas; pro tio estas preferinde uzi, anstataŭ „daŭro“, la esprimon „samtempeco“ kaj anstataŭ „finitaco“, la esprimon „antaŭtempeco“.

La absolutan daŭron (kaj plurfojecon) oni esprimas en Esperanto per la sufikso **ad** („alvenadis gastoj“), la absolutan finitecon per la „prefikso“ **fin** („li finlernis sian lecionon“).

*

Estas konate ke D-ro Zamenhof konsilis, preferi uzi (sekvante la ekzemplojn de multaj naciaj lingvoj eŭropaj) la formon **ita**, escepte kiam oni volas montri tute precize fariĝon de ago. Tiun konsilon li donis opiniante, ke la logika kaj simetria aplikado de la malsimplaj tempoformoj prezentas por multaj nesuperblan malfacilaĵon. Sed jam Fruictier tre prave skribas pri tio en sia „Vortfarado“:

„Tre certe la kvazaŭ-ĉiama uzado de **ita**

estas tre oportuna por multaj personoj pro niaj nacilingvaj kutimoj, ĉar en multaj naciaj lingvoj ekzistas nur unu (pasinta) pasiva participo, kaj eĉ en tiuj lingvoj, kiuj havas du pasivajn participojn, oni pli ofte uzas la pasintan ol la nuntempan; sed tion ĉi oni faras en tiaj lingvoj, ĉar oni povas montri la diferencon de tempo ankaŭ per aliaj rimedoj (ekz. diverseco de helpaj verboj), dum en Esperanto ni ne povas uzi tian rimedon. Tial, laŭ mia opinio, oni povas rekomendi la preferan uzadon de **ita** nur provizore kaj al tiuj personoj, kiuj estas embarasataj de la diferencigo de **ata** kaj **ita**, simile kiel oni diras, ke en la komenco la rusoj povas ne uzi la artikolon la se ĝi embarasas ilin. Sed la forlaso de **ata** estus tre bedaŭrinda se ĝi generaligus, ĉar ĝi rompus la harmonian simetron, kiu ekzistas inter ia formoj aktivaj kaj pasivaj de nia verbo kaj tio senigus nian lingvon de ŝatinda pens-esprimilo. Cetere **ita** ne estas pli konfuzinda kun **ata**, ol **inta** kun **anta**, kaj komparante la aktivan formon respondantan al la pasiva, kiun oni volas uzi, oni ĉiam trovos klare, ĉu **ita** aŭ **ata** estas la pli ĝusta.“

Supre ni montris ke harmonia simetrio (kia, laŭ Fruictier, ekzistas inter la aktivaj kaj pasivaj formoj) ekzistas ankaŭ inter la diversaj tempoj: estanteco, pasinteco, estonteco. Pri la harmonia simetrio inter la aktivaj kaj pasivaj formoj, Fruictier donas la jenajn ekzemplojn:

Passive

1. Mi estas amata de mia frato.
2. Mi estis amata de mia frato.
3. Mi estas amata de mia frato.
4. Mi estis amata de mia frato.

Aktive

- Mia frato estas amanta min.
Mia frato estis amanta min.
Mia frato estas aminta min.
Mia frato estis aminta min.

„Ĉu io povas esti pli klara (diras Fruictier) ol tiuj paralelaj formoj?“

1. Mia frato amas min en la nuna momento.
 2. Mia frato estis amanta min tiam, en la momento kiam okazis tiu afero, kiun mi rakontas al vi, sed nun li jam ne amas min; la ĉefa afero estas, ke li amis min tiam.
 3. Antaŭe mia frato amis min; nun li verŝajne ne amas min, sed la grava fakto al kiu mi tiras vian atenton estas, ke li amis min iam.
 4. Mia frato amis min iam, sed li jam ĉesis ami min tiam, en la momento, kiam okazis la dirita aventuro; la grava afero estas, ke min ami li jam ĉesis tiam.
- Resume: 1, kaj 2, amata, tiras la atenton

al la daŭro de l' amo en momento nuna (1) aŭ forpasinta, antaŭa (2).

La formoj 3. kaj 4., **amita**, tiras la atenton al la ĉeso de l' amo en tempo nuna (3) aŭ antaŭa (4)."

Ni ankaŭ ripetu, ankoraŭfoje, la klarajn regulojn, kiujn la sama Fruictier en sia „Gramatiko de Esperanto“ donis pri la uzado de la malsimplaj tempoformoj (§ 178): „Resume, tempojn malsimplajn oni uzas plej malofte. Se oni uzas ilin, tiam:

A. Por diri, ke ago estis, estas, aŭ estoe farata en la momento mem, pri kiu oni parolas, oni uzas verbon esti kun estanta participo de verbo esprimanta tiun agon.

B. Por diri, ke ago estis, estas, aŭ estos finita en la momento, pri kiu oni parolas, oni uzas esti kun pasinta (estinta) participo de verbo esprimanta tiun agon.

C. Por diri, ke ago estis, estas, aŭ estos nekomencita ankoraŭ, sed tamen okazos, oni uzas esti kun estonta participo de verbo montranta la agon."

Kvankam ni ne en ĉiuj punktoj konsentas kun la klarigoj de Fruictier pri la diversaj gramatikaj kaj vortfaradaj reguloj, tamen ni devas konfesi ke li bone komprenis la diferencon inter **ata** kaj **ita**. Kaj kiam de iuj flankoj oni asertas ke nia redakcio* estas influata de la germanlingva kutimo, ke ĝenerale germanoj ne bone komprenas la diferencon inter **ata** kaj **ita**, ni esperas tamen ke neniu kulpigos s-ron Fruictier (francon!) ke li influigis sin de la germana lingvo! Nia redakcio ĝenerale evitas, laŭeble, infiuigi sin de nacilingvaj kutimoj, ĉu de germanaj, ĉu de anglaj, francaj aŭ alilingvaj. Sed kiam foje ni devas elekti inter germanaj aŭ alilingvaj influoj, ni plej ofte elektas prefere la alilingvajn, ĝuste por eviti similajn riproĉojn. Cetero, por germanoj estus eĉ pli facile ol por slavoj, uzi la **ita**-formojn prefere al la **ata**-formoj, ĉar la germana lingvo posedas nur unu pasivan particon.

Kaj kvankam eble Zamenhof, opinante ke por kelkaj popoloj la logika uzado de la malsimplaj tempoformoj estas tro malfacila, en sia granda (kelkfoje tro granda) liberalo permesis la nelogikan, nesimetrian uzadon de **ita** anstataŭ **ata**, en kazoj kiam dubo estas netiminda, kaj kvankam eble li mem kelkfoje uzis **ita**, kiam la pli granda logiko postulus **ata**, — tamen ni, al kiuj la logika kaj simetria uzado de **ata-ita** preskaŭ tute ne prezentas malfacilaĵojn, certe rajtas uzi la malsimplajn tempoformojn **korekte, logike kaj simetrie**, same kiel ni rajtas korekte uzi la akuzativon, kvankam Zamenhof konsilis prefere ne uzi akuzativon kiam oni dubas pri ĝia korekta aplikado.

Ĉi sekve ni donas kelkajn ekzemplojn, por montri, kian konfuzon povas kaŭzi la **ne-logika** aplikado de **ita**:

S-ro Sch. estis vizitonta la ministron. Dumvoje li renkontis sinjoron, kiu venis el la ministrejo. Li estis akceptita de la ministro. S-ro Sch. eniris la ministrejon. Ankaŭ li estis akceptita de la ministró.

(Kion signifas tio? Ke la renkontita sinjoro estis jam akceptita, kiam li venis el la ministrejo! Kaj, analoge, ke s-ro Sch. estis jam akceptita, kiam li eniris la ministrejon! ? ? Sensecaĵo, vi diros, ĉu ne? Do, la duan fojon **ita** devas esti anstataŭigata per **ata**. Tute klare!)

Alia ekzemplo:

Sinjoro intencis eniri domon. La pordo estis fermita. Ĝi estis malfermita. La sinjoro eniris.

(„La pordo estis fermita; ĝi estis malfermita“ — ĉu ne paradokse? Jes, pro la erara apliko de **ita**. Kompreneble, en „ĝi estis malfermita“ **ita** devas esti anstataŭigata per **ata**.)

Tria ekzemplo (el Heroldo n-ro 16/669 de 24. 4. 1932, „De mardo al mardo“):

La administra konsilantaro de la brita kolonio Kenya decidis amnestii 60 Ukambanegrojn al mallonga punlaboro. Ili estis kondamnitaj je morto . . .

(Laŭ la argumentoj de niaj kontraŭopiniantoj tio signifus, ke la mortkondamno de la negroj [aŭ: al la negroj, se vi preferos] okazis post la decido amnestii ilin — stranga tribunalo, kiu samtempe decidus amnestii kaj tamen mortkondamnu! El ĉi supra ekzemplo oni klare vidas, kiel necese ofte estas, klare diferencigi inter **samtempeco** [ata] kaj **antaŭtempeco** [ita]. Pro tio estas preferinda uzi **ita** nur, kiam oni volas klare esprimi la **antaŭtempecon** de iu ago rilate al la momento, pri kiu oni parolas.)

Ĉe la aktivaj formoj kaj ĉe la estantaj formoj de l' pasivo preskaŭ neniu havas dubojn pri la korekta uzado, nur ĉe la pasintaj formoj de l' pasivo dubas eĉ eminentaj esperantistoj, kiuj cetero bone scipovas nian lingvon. Ĉu ne estus konsilinde, ke almenaŭ ili klopodus eviti, en estonteco, la nelogikan kaj nesimetrian uzadon de **ita** anstataŭ **ata**?

Je la fino ni donos ankoraŭ kelkajn ekzemplojn, el kiuj oni vidu ke estas tute facile, aplikadi la tempoformojn korekte, — oni povas eĉ diri ke oni povas „jongli“ per ili:

Dum aerbatalo, malamika aeroplano estis ialigata de unu el niaj aviadistoj; la aparato estis detruata de (per) la falo, kaj ĝia piloto estis mortigata. Alvenis homoj. Laŭ ilia konstato, la aparato estis detruita kaj la piloto estis mortigata. (En la lasta frazo oni devas diri **ita**, ĉar la detruo kaj mortigo okazis **antaŭ** la konstato, do ili estis **antaŭtempaj** al ĝi; ili estis jam finitaj, kiam la homoj faris la konstaton.)

Sinjoro promenis (aŭ: estis promenanta) sur trotuaro. Li haltis antaŭ la montrofenestro de magazeno. La fenestro estis bele dekorita (ne: ata). La sinjoro intencis eniri (estis enironta) en la magazeno; sed la pordo estis fermita (ne: ata). Li intencis ekpreni (estis ekprenonta) la anson. En tiu ĉi momento la pordo estis malfermata (ne: ita) de interne, kaj eliris sinjorino. Ŝi estis ŝargita (ne: ata) per multaj pakaĵoj. Kiam la sinjorino estis elirinta, la sinjoro eniris. Li estis afable akceptata (ne: ita) de vendistino. Li deziris vidi multajn objektojn. Ili estis alportataj (aŭ: alportadataj; ne: itaj). La sinjoro aĉetis ilin kaj estis ŝargata. (aŭ: ŝargadata; ne: ita) per ili. Poste li forlasis la magazeno, same ŝargita (aŭ: ŝargadita; ne: ata) kiel la sinjorino.

Zamenhofaj ekzemploj: Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. (Ekzercaro, § 25.) — Ŝi savis al li la vivon, kiam li preskaŭ sen vivo estis pelata de la ondoj. (Fundamenta Krestomatio, p. 41.) — Ĉiu tago estis pasigata feste. (Samloke, p. 55.) — . . . ŝi estis edukata, kiel oni diris, malproksime en unu sankta monaĥejo. (Samloke, p. 55.)

La tri lastaj ekzemploj montras ankaŭ, ke Zamenhof uzis por la rakontado la unuan pasintecan (kutime nomatan „imperfekto“), tio estas en la aktivo la formo **is**, kaj en la pasivo la formo **estis** **ata**. La sama validas por **raportado**. Ofte oni komencas iun raporton per konstato, kaj nur poste rakontas la fariĝadon de la agado: Armistico estas decidita inter A-lando kaj B-lando. Hierau kunvenis la delegitoj de ambaŭ popoloj. Mul-

taj gravaj punktoj estis pritraktataj, kaj tie ankaŭ estis decidata la armistico. Estis nomata speciala komisiono . . . ktp.

Sufiĉas. Espereble, post atenta tralogo de ĉi supra artikolo, al multaj la „problemo“ **ata-ita** nun fariĝis pli klara. T. J.

*

Respondoj al kelkaj leteroj:

W. W. P. en B. El la ekzemploj ĉerpitaj el la F. K. nur unu frazo estas Zamenhofa, kaj ĝi montras la formon **is** **ata**; vidu supre. Kelkfoje oni povas supozi ke **ita**-formo estas adjektivigita participo, ekz.: . . . ĉio estis ravita. Simile kiel: la gazeto estis presita (do, ne hektografita); la revuo estis ilustrita; la valo estis ĉirkaŭita de montoj.

J. R. en O. Vi intermiksas la momenton, pri kiu oni parolas, kun la momento, en kiu oni parolas (vidu supre) — jen ĝuste la ĉefa eraro farita kaj farata de tiuj, kiuj nelogike uzadas la malsimplajn tempoformojn. La formo estis **ita** pro la dufoje akcentita pasinteco (is kaj ita) ja per si mem indikas ke ĝi signifas antaŭtempecon, antaŭan pasintecan, antaŭan finitecon, do tion kion en latina lingvo oni nomas pluskvamperfekto. La sufikso **ad** ne estas samsignifa kun **ant**: **ad** signifas absolutan daŭron aŭ plurfojecon, sed **ant** signifas samtempecon.

E. S. en Br. Vidu parte la antaŭan respondon!

S. St. H. Ni legis vian artikolon en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 7/8. Ni skribis supre, ke oni devas pritrakti la temon libere de nacilingvaj formoj. Vi direktis vin laŭ modelo de la bulgara lingvo, ni direktas nin laŭ la logiko kaj simetrio — pro tio ne povas ne rezulti diferenca opinio. Tute erara estas via opinio ke „estis gajnata“ signifas en aktiva formo: „ni gajnadis (s-ron profesoron B.), sed ĝis nun ni ne gajnis ĝin“. Unue, ne: **at** = **ad**; due, vi intermiksas „gajnad“ kun „provadi gajni“ — se oni gajnadis s-ron B., oni certe ĝis nun gajnis lin, eĉ plurfoje aŭ por pluraj aferoj!

G. S. en P. Via ideo pri la kartetoj estas interesa. Sed estas dubeble, ĉu la nekomprenejoj fariĝus pli klaraj en sia kapo per la uzado de tiuj kartetoj.

H. B. en A. Jen via artikoleto:

Ankoraŭ iom pri **ata** kaj **ita**.

En la numero 10 (663) de Heroldo, nia ĉefredaktoro klarigas la diferencon inter **ata** kaj **ita**. Ekzistas tamen kazoj, en kiuj oni rajtas dubi. Antaŭ nelonge, revidante la presprovojn de ia scienca vortaro, mi trafis, ekzemple, inter multaj frazoj kun **ita**, la jenajn: »lepro, malsano kaŭzita de Hansen'a bacilo; — koakso, substanco eltirita el terkarbo; — akvo, likva korpo komponita el hidrogeno kaj el oksigeno.« — Nu, post iom da hezito, mi korektis per **kaŭzita**, eltirata kaj eĉ **komponata**. »Tondro! Kontraŭdiris la verkinto, la akvo estas ja de longe komponita. — Jes, certe mi respondis; sed, en fiemo, kiam oni volas fabriki (komponi) akvon, oni ĝin ĉiam komponas el H²O.« Konsekvence, en tiaj kazoj, ni ne estu tro absolutaj; la diferencigo starigata (aŭ starigita) de s-ro Kalocsay, Lingvo, Stilo, Formo, p. 84, inter la ilo kaj la materialo, ŝajnas al mi iom tro subtila. H. Boucon.

Ĉiun redakcian materialon

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.

Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro

Rollet de l' Isle.

(Internacia Scienca Asocio Esperantista, Sekcio de Teknikaj Vortaroj), Parizo 1931.

La verko ludas rolon de fundamenta bazo por la disvolviĝo de Esperanto en scienco kaj tekniko. Pri la neceso de tiu bazo ne utilas substreki: pri la graveco de la verko estas jam sufiĉa rekomendo la eminenta nomo de la verkinto, kiu kvazaŭ malfermis por Esperanto la vojon al matematikaj sciencoj.

La fakaj ĉeftermoj estas dividataj en kvin grandaj grupoj kaj subdividataj en deknaŭ ĉapitroj. La unua grupo koncernas matematikajn sciencojn; la dua astronomion; la tria fizikajn sciencojn; la kvara teran fizikon; la kvina natursciencojn. Oni do povas diri ke neniu verkonto de teknikaj kaj sciencaj vortaroj povos ne deiri de ĉi tiu libro. Sekvas de tio, kaj ĝia eksterordinara graveco, kaj la eksterordinare zorga kritiko kiun ĝi postulas, precipe en rilato kun la decidoj alprenitaj por internacia terminaro kaj internaciaj difinoj ĉar de fakaj kunvenoj pure sciencaj aŭ teknikaj, ne esperantistaj.

Tian ampleksan kritikon mi ne kuraĝas certe entrepreni, esperante ke ĉirkaŭ la libro iom post iom aperos rimarkoj kaj konsentoj de ĉiuj esperantistaj teknikistoj kaj sciencistoj, kaj ke „Lingva Kritiko“ iĝos vasta diskutujo pri ĉi tiu tiom grava temo: la lingvo de la scienco ĉirkaŭ Esperanta kerno.

Nur mi provos atentigi pri kelkaj terminoj pri kies definitiva akcepto kaj sekva oficialigo mi persone estus dubema. Mi ilin prezentas nur kiel apartajn detalojn pri kiuj speciale sciencistoj kaj teknikistoj devus pripenŝi kaj interdiskuti.

Paĝo 19: **tanganto**. — Ĉar jam konata kaj oficiala estas la termino tangento, mi opinias preferinda la elekton de Verax: **tanganto**, la geometria t.; **tangento**, la trigonometria. Tiu oportuno evidentiĝas ekz. ĉe difino de derivajo: tangento de tanganto. Jen resume kiel mi nomus la trigonometriajn funkciojn: **sino kosino, tangento kotangento, sekanto kosekanto**.

Paĝo 23: **vivpovo**. — Povo (aŭ prefere **potenco**) estas mekanike F. L. T⁻¹; kaj M. V² = F. L.; prefere do **vivoforto**, aŭ **movenerĝo**. — **Movkvanto** tre malfacila laŭ prononco: **movokvanto**.

Paĝo 25: **westo**. — Malaprobinda kaj nepre kontraŭfundamenta la enkonduko de w en Esperantaj vortoj: kiel oni ĝin prononcu? Aŭ ni havus du signojn por nur unu sono, aŭ ni difinus novan sonon, nepre ne internacian. Kaj tio nur por du aŭ tri vortoj, nepre ne internaciaj. Mi jam proponis kaj uzis **ovesto**; ankaŭ **oesto** povus taŭgi. Mi plezure konstatis ke pri **varfo** (**warfo**), **visto** (**wisto**) la uzado kaj la Plena Vortaro min pravigas.

Paĝo 26: **ekvinoksa fruigo**. — Mi ŝatas pli precizan kaj fakan terminon.

Paĝo 28: mi ne komprenis la sciencon gravecon de la monotonio, kaj tagnomoj, kiujn oni estus povintaj flankenlasi en tia verko.

Paĝo 29: **falstelo**. — Malbone prononcebla vorto: eble plibone **falanta stelo**.

Paĝo 29: **fakuloj**: certe pli bona **fakloj**, de mi jam uzita ĝuste pri sunfiziko. La erarkompreno **fak-uloj** estas evitata, kaj la vorto mem estas pli bela kaj malpeza.

Paĝo 30: **likvida**. — Kial Plena Vortaro enhavas **likva**?

Paĝo 31: Mi preferus difini densecon ne kiel specan pezon, sed kiel M. V⁻¹.

Paĝo 32: **kaloro**. — Aprobinda teorie; sed mi dubas ĉu fakte **varmo** ne estus uzbla ankaŭ laŭ scienca signifo. Naciaj lingvoj ne bezonas duoblaĵon.

Paĝoj 33 kaj 34: elektraj terminoj. — Longe mi devus skribi pri tiu ĉi temo. Elektro bezonas kiel kemio apartajn sufiksojn: mi jam proponis inter ili **iv** kaj **anc**, laŭ kiuj oni ricevus la seriojn

kondukti	konduktiva (iveco)	konduktanco
suscepti	susceptiva	susceptanco
admiti	admitiva	admitanco
rezisti	rezistiva	rezistanco
reakti	reaktiva	reaktanco
impedi	impediva	impedanco
kapaciti	kapacitiva	kapacitanco
kondensi	kondensiva	kondensanco
indukti	induktiva	induktanco

En tio jam la naturaj lingvoj, kiel ĉe la mezure sistemo, atingis Esperantan regulecon: nepre ne estu Esperanto malpli regula ol ili.

Paĝo 34: kial **fluo**, kiam en Pl. Vortaro estas **kurento**? Por mi **kurento** estas senutila balasto kiun oni ne estus devintaj enkonduki tiel facilanime; sed ĝi jam preskaŭ venkis definitive.

Paĝo 34: kio estas **coulombo**? Nek Esperanto nek nacia lingvo. Oni diru kuraĝe **kulombo**, same kiel angloj diras **volts** el la itala nomo „Volta“. Tiuj propraj nomoj fakte iĝis ordinaraj terminoj, kaj ili nature sekvas ties sorton: ili perdas la unuan formon nacian.

Paĝo 34: kial **cirkuito**, dum Pl. Vortaro jam enhavas **cirkvito**?

Paĝo 35: **watto**. — Sama rimarko kiel pri **coulombo**.

Paĝo 35: **ohmo**. — Sama rimarko: aŭ **ohm** aŭ **omo**, aŭ nacilingva tute aŭ Esperanta tute.

Sub elektro mi ŝatus la enkondukon de la tre trafa traduko proponita de nia eminenta kaj neforgesebla samideano Komandanto Peri: por montri la rektan cirkviton en kelkaj naciaj lingvoj nomata „mallonga“: **nulrezista cirkvito**.

Por montri aparatojn, maŝinojn ktp., mi siatempo proponis la enkondukon (laŭ sugesto de Prof. B. Migliorini) de la duobla sufikso **-ad-or-**: or estas speciala teknika sufikso montranta la aganton, laŭ nacilingvaj **-ore, -eur, -er-**: anstataŭ ilin alglui al latina participo **at**, lingvo internacia ilin algluu al sufikso montranta la daŭron de agado, t. e. al **ad**. — Tiel ni havus, de **altern'**, la derivaĵojn **altern-ad-or-o**, kaj simile, **trans-form-ad-or-o**, ktp. Simpla enkonduko de **unu** sufikso, kiu donas formojn tre similajn al la internaciaj, ĉar parencevenaj, kaj pure laŭfundamentajn, kaj malsparigas la penon enkonduki amason da duoblaĵoj, balasto en vortaro, kiel **akumul' akumulator', altern' alternator', gener' generator'**, ktp. — Pri tio la redakcio de „Lingva Kritiko“ ŝatus malfermi diskuton inter teknikistoj.

Daŭrigante la foliumadon de tiu verko, kiu kvazaŭ malfermas novan epokon en la historio de la interlingvo teknika, mi renkontas sur paĝo 36 **rezono** — akustika termino, kiu tre surprizas min; mi komprenas ke **rezono** estus simpla resendo de sono, kaj ne kun-

vibrado ktp., do netaŭga esprimo. Mi trovas en Schломann II, 191, 5 **Resonanz, resonance, resonance, rezonans** (ruse), **risonanza, resonancia**; mi memoras ke mi ĵus parolis pri speciale teknika sufikso **anc**, montranta econ, proprecon fizikan mezureblan, rilatantan difinitan fenomenon; ĝuste kiel nun **resoneco** montras nur larĝsence kapablon resoni, ian ne difinitan kapablon, ĝeneralan, kaj ni bezonas male indiki tiun specialan, difinitan kunvibradon kaj nur kiam ĝi okazas jene kaj jene: ni povas apliki la precizegencan teknikan sufikson, kaj diri: **reson-anc-o** (**resonanco**, ne **resoneco**, nek **rezono**) estas speciala **resoneco**, kiam du korpoj kunvibras, ktp. — Mi ree substrokas ke fundamento de teknika Esperanto devas precipe atentigi tiujn teknikajn sufiksojn, kiuj ludas internacian rolon, kaj ne atenti la Esperantajn formojn de la komuna lingvo, kiuj riskas devojigi. La Esperantemo estu en la prefero por fundamentema aplikado de sufiksoj kaj ne en la blinda sinlimigo ĉe la neteknika Zamenhofa Esperanto: tiu blindeco riskus devigi al enkonduko de senfinaj duoblaĵoj kaj mallogikajoj, ĝuste kontraŭaj al la spirito de Esperanto. Ni ne forgesu ke teknika terminaro estas jam mem ĝis ia grado Esperanto en senkonscia disvolviĝo, kaj en kerno la Esperantaj principoj estas jam aplikataj de la teknika lingvaĵo internacia.

Paĝo 36: **interfero**. Mi aprobas la radikon **interferi**. Tamen mi devas noti ke mia orcio, kiel ĉiu orelo de elektroteknikisto verŝajne, estas ŝokata, ĉar la unua ideo kiu sin prezentas estas tiu de la spaco inter **indukt-or-o** kaj **indukt-at-o** en dinamo aŭ altern-ad-or-o; cetere estas plej internacia la nomo **interferenc-o**. Plejbona estus tamen ne la enkonduko de nova substantiva radiko **interferenc** apud la verba **interfer** sed simpla apliko de teknika sufikso **anc** = **interferenc**.

Paĝo 36: koloro de sono. — Kial ne **tembro** kiel en Pl. Vortaro aŭ ev. **timbro**?

Paĝo 36: **tonforko** = **diapazono**, Pl. Vort.; **agordo** kaj **akordo**; malfacila diferenco, en kiu eble kuŝas fakta manko de la vortaro; mi estus ŝatinta prezenton de ambaŭ vortoj kune kun klara klarigo fizika.

Paĝo 48: **preseraro, actinometroj**.

Paĝo 51: kial **pluviometro** kaj ne **pluvmetro**? En scienco la vorto **-metro** sufikse uzata havas ĝeneralan signifon **mezurilo**.

Paĝo 63: **malhundo** preseraro anstataŭ **melhundo**.

Paĝo 65: Pl. Vort. enhavas **kormorano**, Verax **hidrekorako**: ŝajne Plena Vortaro pli pravus, ĉar pri tia specaj popularaj bestoj la ordinara nomo estas pli grava ol la scienca.

Paĝo 65: **falco**, preseraro anst. **falko**.

Paĝo 67: **tino**. — Certe preferinda **tuno**, radiko erare uzita por **tonelo**. **Tonelo** estas ĝuste uzata en ĉi tiu vortaro por **milkilogramo** aŭ simila (ne metra) mezurunuo. **Tuno** estas taŭga por la fiŝo. La latinigrekaj y de **thynnus** ŝanĝiĝas en eŭropaj lingvoj en u aŭ o; plie **tino** havas alian signifon (Z). Pri **tino tuno tono tunelo tonelo** mi jam skribis en „Esperanto-Praktiko“ kaj „Itala Esperanta Revuo“, kaj ĵus parolis en „Lingva Kritiko“ mem s-ro Le Brun, tute prave. La definitive akceptindaj signifoj estas laŭvice: **kuvo, fiŝo, eco de sono, feroja monta traborajo, milkilogramo**.

Paĝo 68: kial **arakeo** kaj ne **araneo**?

Paĝo 80: **preseraro, kristaligita**; alia, **disigita**; alia, **kristaligita**.

Eble oni estus ŝatintaj havi en tia fundamento plenan tabelon de la teknikaj sufiksoj kaj prefiksoj; precipe ŝajnus utile ordigi la uzon de kelkaj, diskuti la novajn kiel **-or,**

-anc, ktp., kaj repreni, ekzemple la difinon // de Boirac pri distingo inter ojd kaj oid: la unua montranta en kelkaj sciencoj la simplan similecon, la alia montranta en sciencoj la familian kies tipo estas . . . — Sed pri tio eble revenos baldaŭ al ampleksa diskuto „Lingva Kritiko“.

Neniam sufiĉe estos altirata la atento de esperantistoj-teknikistoj kaj sciencistoj al la neceso ordigi kaj oficialigi (post sufiĉa esplorado kaj diskutado) unue la fundamentaĵoj de ĉiu scienco kaj fako; sekve, neniam sufiĉe estos rekomendata la arenta kaj ĝisfunda studado de ĉi tiu verko, kaj la komparo de ĝiaj terminoj kun tiuj de Verax, de Wüster, de Boirac, por la kiel eble plej frua alveno al definitiva Fundamento de sciencoteknika Esperanto. Rinaldo Orenco.

LINGVA TRIBUNO

Pri karesa sufikso.

(Ril. al Lingva Kritiko n-ro 2.)

La uzo de la sufiksoj „ĉj“ kaj „nj“ ŝajnas esti tre rigida kaj malfacila. Laŭ bonsonoro nur la ĉi-subaj formoj plaĉas al mi:

panjo, paĉjo, Joĉjo (kies mallongigo ĝi estas?), Peĉjo? — ĉe Mario: Marinjo? Manjo? aŭ Marnjo? — filinjo? Eĉ mi spertis, ke la plej multaj esperantistoj nur malofte uzas ilin — ĝuste sekve de ilia rigideco.

Georgo Steiner, Győr.

*

Pro malofteco de tiu signifo oni preferas uzi adjektivon, ekz. beleta, kareta, kortuŝa. Sed se la Lingva Komitato deklaras tiun signifon inda je afikso, mi avertus kontraŭ nura „j“ kaj preferus „etj“. La nura „j“ pro sia simpleco kreus ŝanĝdangerojn, precipe post la radikinoj „e“ kaj „u“:

idejo = bela ideo aŭ ejo por la idoj;

armejo = bela armeo aŭ ejo de armado,

revujo = bela revuo aŭ lando de revoj,

noktujo = bela noktuo aŭ regno de l' nokto,

Komparu: aranejo, arejo, arkejo, lakejo, finejo, statujo ktp. Du afiksoj, j kaj tj, por tiu malofta signifo estus certe malŝparo.

G. Schattat.

*

Estas vero, ke, kiel diras D-ro Privat, la du karesaj afiksoj -ĉj- kaj -nj- estas malsukcesaj; cetero, D-ro Zamenhof ilin destinis nur por la propraj nomoj; kaj ekster sia kampo, ili nur aldonigis al la vortoj patro kaj patrino. La bezono pri karesa sufikso por komunaj nomoj estas do kontentigata en Esperanto per apliko de la diminutiva sufikso -et-. Tiu ĉi uzo estas perfekte konforma al la uzado de la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kie la samaj sufiksoj servas kiel malgrandigaj kaj karesaj. Tiel okazas en itala, hispana, portugala, germana, greka, slavaj lingvoj kaj, laŭ pli malgranda skalo, ankaŭ en franca kaj angla lingvoj.

La alprenado de speciala sufikso estas do nenecesa. Cetero, la proponitaj sufiksoj -j- kaj -etj- estas nepre malkonsilindaj. La konsonanto -j- estas formata per alproksimigo de la laŭga dorso al la palato: ĝi estas palatalo; sed ĝi efikas tiel, ke la semper antaŭirantaj konsonantoj fariĝas ankaŭ palataloj. Ĉi tiuj palataligitaj konsonantoj estas malmulte stabilaj kaj oni emus asimili la du sonojn, kiel tio jam okazas en la kelkaj lingvoj, kiuj posedas tiajn sonkombinojn. Resume, la enkonduko de la nenecesa karesa sufikso -(ĉj)- malutilos rekte la klaran pro-

nonceblon, kiu ja estas unu el la ĉefaj bonaj ecoj de Esperanto.

Imitante do la naturajn lingvojn, ni senhezite uzadu la trafite elektitan sufikson -et- por la du signifoj. Stefano La Colla.

Tuno.

De G. Schattat.

(Ril. al Lingva Kritiko n-ro 1.)

La vorto „tuno“ troviĝas nek en la Oficiala Klasika Libro, nek en la „duon-oficiala“ Kabe-vortaro, sed en aliaj vortaroj (Christaller, Bennemann ktp.) kun la signifo de ŝipmezurilo. Teorie ni havas:

3 vortojn: tono, tuno kaj elekteleblan novan vorto,

3 signifojn: muziksonon, ŝipmezuron kaj fiŝon.

La unua vorto kaj la unua signifo jam estas kunigitaj oficiale. Dua signifo de la vorto „tono“ estas evitinda. La vorto „tono“ kaj la signifo „muziksono“ do estas eliminataj el la plua rigardado. Restas nur:

2 vortoj: tuno kaj elektelebla nova vorto;

2 signifoj: ŝipmezurilo kaj fiŝo.

*

Se por du signifoj prezentigas unu vorto, Zamenhof ordinare elektas inter tri vojoj:

A. li prenas unu radikon el romanda (latinida) lingvo, alian radikon el germanida lingvo, ekz. piedo, futo.

B. li aliigas la vokalon por unu signifo, ekz. nebulo (germane Nebel) pro la diferenco inter nebula kaj nebela.

C. li plilongigas la radikon por unu signifo, prefere per literoj el nacia esprimo, ekz. parto, partio, polso, poluso.

La aliigitan vokalon aŭ la plilongigon ricevas ordinare la malpli ofta signifo. Laŭ „Libro de la germana lingvo“ la proporcionoj de ofteco estas ekzemple:

parto ĉ. 4000,

nebela ĉ. 100,

partio ĉ. 2000,

nebula malpli ol 5.

*

Botaniko kaj zoologio havas tiom da nomoj, ke neniu mortdevulo povas lerni ilin dumvive. Al ĉiu vorto de l' ĉiutaga vivo oni do povas aldoni botanikan aŭ zoologian nomon de sama aŭ simila formo. Do ne ĉagreniĝu pri tiaj similecoj!

Rilate al la menciitaj signifoj de la ŝipmezurilo kaj de la „konkuranta“ fiŝo la lasta signifo estas la malpli ofta. Do la fiŝo meritas aŭ aliigon de vokalo aŭ plilongigon per literoj el nacia nomo.

Por la fiŝo Christaller nomas tri esprimojn (tino, tuno, ton-fiŝo), el kiuj Bennemann preferas la esprimon „tino“, elektante la vojon B de Zamenhof. Mi mem preferas la esprimon „tuno“, uzante la vojon C de Zamenhof, laŭ la angla vorto tunny. Ebla estas ankaŭ „tinuso“ laŭ la latina nomo „Thynnus“. Ĉiukaze la mallonga vorto „tuno“ restu por la pli ofta signifo de ŝipmezurilo.

Ni opinias, ke la pli bona solvo estas tiu proponita de s-ro P. Le Brun: la nomo de la fiŝo estu tuno kaj tiu de la mezuro tonelo. Ni ne povas konsenti tamen kun s-ro Le Brun pri la derivita vorto tonelajo, ĉar la signifo de la sufikso -ajo tute ne permesas la derivon. Oni diru prefere tonelkvanto aŭ ĉ. tonelumo.

N. d. l. Red.

„Edzo“ kaj „haladzo“.

Unu el niaj plej malnovaj samideanoj, prelato A. Dambrauskas (Dombrowski) skribas: „Pridisputindajn mi trovas nur du Esperantaj vortojn: edzo kaj haladzo. Al mi estas tute neklara ilia deveno pro tute neesperanta sono dz; ĝi ŝajnas al mi esti tute fremdnatura, neesperanta. El de jaro 1887 la supre diritaj du vortoj min turmentas. Do mi estus tre dankema al nia Akademio, se ĝi ilin anstataŭus per du novaj de romana aŭ angla-germana deveno . . . Al mi eĉ ŝajnas, ke la edzo kun haladzo eble tute ne trovas defendistojn aŭ trovas nur tre malmultajn. Mi estus al Vi tre dankema, se Vi bonvolus movigi tiun malgrandan demandon, aŭ almenaŭ klarigi al mi el kia lingvo devenas tiuj du abortuloj edzo kaj haladzo.“

La enigman devenon de edzo oni jam klarigis multajn fojojn. En la „Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto)“ sur paĝo 32 oni legas:

„Dank' al la afableco de s-ro D-ro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo . . . La vera primitiva formo estas ne edz, sed edzin, de kiu devenas la formo edzo . . . La vorto edzino estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita.

Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon:

En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata Kronprinz, kiu fariĝas en Esperanto kronprinco. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane Kronprinzessin. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante kronprincezino, kaj li tuj rimarkis, ke la finigo de tiu vorto, t. e. edzino, ricevis per si mem la sencan de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: anue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto edzino li tute logike devenigis la vorton edzo.“

(Laŭ artikolo de Emile Boirec en la Oficiala Gazeto, Dec. 1913.)

Haladzo devenas de la latina vorto exhalatio, kiu troviĝas en la franca kaj angla lingvoj kaj, kiel „fremdvorto“, ankaŭ en la germana lingvo. Evidente, ĝi estis enkondukita en nian vortaron dum la plej frua periodo, kiam oni senkompatate detranĉis la komencajn literojn, se ili egalas sufikson, kaj oni modifis la finajn literojn, se ili estis egalaj al iu sufikso.

Estas tamen strange, ke la germanan sufikson -essin oni transskribis per -edzin, anstataŭ -esin, laŭ la prononco, kaj same (ex)halatio per haladzo anstataŭ halacio. Oni ricevis tiel ne nur krupligitajn formojn sed ankaŭ strangan skribmaneron, kun la enkonduko de sono, kiu ne apartenas al la esperanta sonaro. Dz estas pola dulitero, kiu indikas voĉan afrikaton, korespondantan al nia senvoĉa afrikato c, simile kiel z korespondas al s: la sono dz ekzistas en la itala kaj angla lingvoj, krom en la slavaj.

Nu estas tasko de nia Akademio iel modifi la Fundamenton de Esperanto, al kiu la du vortoj apartenas; ĝi povus nur konstati kaj oficialigi uzon ĝenerale disvastigitan, eĉ se preterfundamentan. Sed niaj literaturistoj kaj verkistoj rajtas ja iniciati ŝanĝon.

Ni kreas tamen, ke estos tre malfacile anstataŭigi -edz-, kiu fariĝis „esperantismo“ kaj bone taŭgas por la kunmeto kaj la derivado. La afero estas multe pli facila ĉe haladz-, malofte uzata vorto, kiujn niaj sciencistoj povus tre bone anstataŭigi per alia teknika termino.

S. L. C.